FN PER ANC 47

N°251 SEPTEMBRO 2012

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

## Ĝenerala Asembleo de Esperanto-Normandie

Normandaj Esperantistoj estis invititaj partopreni ĝeneralan kunvenon de sia unuiĝo la dimanĉon 13an de Majo en la Maison des Associations d'Hérouville Saint Clair.

Kvankam oficiala kaj statuta, tiu kunveno estis ankaŭ amika renkontiĝo kiu ebligis al ĉiu retrovi longjarajn geamikojn aŭ konatiĝi kun novuloj. Bela kaj varma vetero ebligis konversaciojn en la ĝardeno : tiaj konversacioj firmigis amikecligilojn inter la membroj.

Heruvil-klubo estas plej aktiva grupo en nia regiono. Ĝi disponas en tiu domo de asocioj ĉambron kie ĝi starigis bibliotekon kun variaj kaj valoraj verkoj je dispono de membroj. Heruvil-klubo organizas vojaĝojn en Rusion, en Japanion, kaj aliloken kaj ankaŭ akceptas famajn, fremdajn esperantistojn kiuj turneas en Francio. (Inter la lastaj, venis Roman Dobrzynski, Rodica Todor, Anna Löwenstein)

### *Morala Raporto :*

Inter la 5 normandaj departementoj , 4 estis reprezentitaj :

Kursoj de Esperanto okazas en :

- Manche : en Coutances de Jeanne Schertzer
  en Granville de Christian Levesque,
- Orne : en Flers de Anne-Marie Leprevost,
- Calvados : en Hérouville de Gérard Sénécal,
- Seine-Maritime en Le Havre de Sylvie Caron kaj en Yvetôt de Pierre Pottier.

Bedaŭrinde, ne plu estas kurso en Grand Quevilly kaj Rouen.

Ni memorigas la celojn de nia asocio :

- Subteno al lokaj kluboj
- Eldono de regiona bulteno
- Akcepto de eksterlandaj prelegistoj (Yves NICOLAS, nia Prezidanto estas nacia organizanto de tiuj turneoj)

La raporto estas unuanime akceptata.

### *Financa Raporto :*

Nuraj enspezoj estas kotizoj de membroj (8€ depost multaj jaroj).

Elspezoj koncernas presadon kaj poŝtajn sendojn.

Subvencioj estas donacataj al grupoj kiuj organizas aktivaĵon.


Pere de grafikoj, Pierre Lemarchand projekcias kontojn de jaro 2011 kaj nunajn kontojn.

Kontoj estis kontrolitaj de Pierre Jouvin.

La raporto estas unuanime akceptata.

### *Raporto pri Normanda Esperanto Bulteno :*

La bulteno estas sendita sub koverto al membroj kiuj pagis sian kotizon . …/…



*Roman DOMBRZYNSKI*

### *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Maurice Locret : | 2 |
| Stage Espéranto : | 3 - 4 |
| Ni donu ŝancon al objektoj : | 5 |
| Mil Eŭroa ludo. | 5 |
| Selektiva aborto de knabinoj : | 6 |
| Bela legendo : | 6 |

Sed povas legi ĝin senpage, sub kolora formo ĉiu persono kiu havas Interreton Alvokon ni sendas al grupestroj kaj kursgvidantoj : Bonvolu komuniki al Pierre Lemarchand poŝtajn kaj interretajn adresojn de klubanoj kaj lernantoj.

Ni esperas ke tiuj kiuj legas bultenon per interreto, iam kotizos se ili aprobas nian agadon favoran al Esperanto.

Pri enhavo de artikoloj, nenia riproĉo. Ni tamen esperas pli da verkemuloj.

La raporto estas unuanime akceptata.

### *Renoviĝo de la estraro :*

Okazas nenia ŝanĝo :

Prezidanto : Yves NICOLAS

Kasisto /Bultenisto : Pierre LEMARCHAND

Sekretario : Pierre QUILLAUD


La kontokontrolisto estas Pierre JOUVIN

### *Projektoj :*

Klubo de Hérouville St Clair studas eblecon organizi Interasocian Renkontiĝon de francaj esperantistoj. Tiu projekto estas peza kaj alvoko estas farita al aliaj normandaj grupoj por helpi la eventualan organizadon.

Post tiuj informoj kaj diskutoj, kunveno estis fermata kaj ĉiuj proponis al aliaj manĝaĵojn alportitajn . Ni multe kaj varie kunmanĝis. Post tiu regalo, ni trinkis kafon kaj ni estis pretaj por aŭskulti la prelegon de **Roman Dobrzynski.**

Petro KIJO




*Yves NICOLAS alparolas la gepartoprenantojn*

## MAURICE LOCRET

Jen retrovita foto de Maurice Locret (1915-2002). Certe la plej malnova esperantisto de Esperanto Hérouville.

La foto datumas de Aŭgusto 1936 kiam Maurice militservis (1935-1938 en submara ŝipo "Lamotte-Picket") kiel ŝipa ĉefmekanisto. Temas pri renkonto kun gimnaziaj aŭ studentaj esperantistoj en Muroran (Japanio). Kiam li haltis en haveno, Maurice provis kontakti la lokajn esperantistojn, notinde en Japanio kaj en Ĉinio (li gardis multajn vizitkartojn). Li sidas plej dekstre. Apude, alia maristo : Henri Berthelot



Mi renkontis lin plurfoje en 90aj jaroj. Per la japanaj vizitkartoj, ni provis rekontakti japanajn esperantistojn. Mi memoras, ke unu respondis : li loĝis en Nagasaki kie eksplodis unu el la atombomboj. Ambaŭ homoj travivis la duan mondmiliton, kiun Maurice tre aktive partoprenis kiel rezistanto. Li estis la sekciestro de la tiama rezistorganizaĵo "Front National" en Honfleur. Post la dua mondmilito li fariĝis ĉefredaktoro de "L'Aurore de Basse-Normandie" kaj daŭre aktivis en la Komunista Partio. (Pliaj informoj legeblas per Google. Tajpu "Maurice Locret").

Mi memoras pri tre afabla kaj vigla homo. Ankaŭ tre modesta pri sia rolo dum la dua mondmilito : li plie nenion diris al mi. Mi informiĝis pri tio nur post lia morto.

Yves NICOLAS

## ***STAGE ESPÉRANTO*** *( Initiation et perfectionnement )*

### Samedi **17** et dimanche **18 novembre 2012**

### à **Hérouville - Saint - Clair** (14, Calvados)

### Maison des Associations 10 - 18 Grand Parc

Ce stage sera dirigé par **Svetlana SMETANINA**, espérantiste de **Moscou.** Titulaire d'un diplôme international d'enseignement, Svetlana anime des stages dans de nombreux pays. Elle donne également des cours d'espéranto pour adultes dans deux universités de Moscou.

***Infos pratiques:***

**- Hébergement :**

Pour les personnes qui viendront de loin et qui en feront la demande sur la fiche d'inscription, il sera possible d'être accueilli samedi soir par les espérantistes locaux.

**- Repas :**

Afin de ne pas perdre un temps précieux en nous déplaçant vers un lieu extérieur pour manger, nous avons prévu de proposer aux stagiaires une formule de restauration rapide sur place (5 euros le repas) les samedi midi, samedi soir et dimanche midi (voir la fiche d'inscription).

**- Animations en dehors des cours**

Ce seront des membres d'Hérouville Espéranto qui assureront les animations pour le groupe qui ne sera pas pris en charge par Svetlana (voir le programme).

**- Contacts**


Gérard Sénécal 06 89 74 26 65 gigesenecal@gmail.com

Yves Nicolas 06 44 87 22 48 yvanmi@club-internet.fr


**PROGRAMME DU WEEK - END :**

### SAMEDI 17 NOVEMBRE :

Accueil à partir de 8.30 à **la Maison des Associations, 10 - 18 Grand Parc à Hérouville**

9.00 -13.00 : Cours d'initiation par la méthode directe avec Svetlana SMETANINA
Pause café / thé / gâteaux à 11.00

9.00 -13.00 : Animations pour le groupe de perfectionnement : jeux et chant
Pause café / thé / gâteaux à 11.00

13.00 -14.00 : Restauration rapide sur place

14.00 -18.00 : Cours de perfectionnement avec Svetlana SMETANINA
(paroliga rondo kaj konversacirondo)
Pause café / thé / gâteaux à 16.00

14.00 -18.00 : Animations pour le groupe d'initiation : film "Hérouville-Espéranto au Japon
suivi d'une discussion ; chant.

19.00 -20.30 : Restauration sur place.

## DIMANCHE 18 NOVEMBRE :

9.00 -13.00 : Cours d'initiation avec Svetlana SMETANINA

Pause café / thé / gâteaux à 11.00

9.00 -13.00 : Animations pour le groupe de perfectionnement: "Au restaurant" ;

film "Hérouville-Espéranto au Japon" (V.E°)

Pause café / thé / gâteaux à 11.00

13.00 -14.00 : Restauration rapide sur place

14.00 -17.00 : Cours de perfectionnement avec Svetlana SMETANINA

14.00 -17.00 : Animations pour le groupe d'initiation : jeux et chant

17.00 -17.15 : Pause café / thé / gâteaux

17.15 -17.45 : Les deux groupes chanteront ensemble les chants appris

18.00 : Fin du stage - Premier bilan

**N.B.** Ce pré-programme est susceptible de subir de petites modifications

---

**STAGE ESPÉRANTO**

***Initiation - Perfectionnement***

***Samedi 17 et dimanche 18 novembre 2012***

***à HÉROUVILLE-SAINT-CLAIR (14)***

**Fiche d'inscription (1 par personne)** ***Prière de faire des photocopies, si besoin.***

**Nom :** ................................................ Prénom : ..............................

**Adresse** : ..................................................................................................

..................................................................................................

Tel. : .......................... Courriel : ........................................................

**Niveau souhaité** : **Initiation :** oui non **Perfectionnement** : oui non

**Je souhaite être hébergé samedi soir** : oui non **personne seule** : oui non

**Couple** : oui non

**Frais d'inscription** : (25 euros) : .......

**Repas :** (5 euros) : samedi midi : oui non .......

samedi soir : oui non .......

dimanche midi : oui non .......

**Total** : .......

**Fiche d'inscription** à renvoyer **avant le 15 octobre 2012** avec le règlement

(chèque à l'ordre de **Hérouville - Espéranto**) à

**Nicole JEHENNE - LEDRAN**

**L'embellie 8 rue de Pont l' Évêque**

**14880 HERMANVILLE -SUR - MER**

**N.B.** Le nombre de participants dans chaque groupe sera limité à **15.**

Les inscriptions seront donc enregistrées dans l'ordre d'arrivée.

# NI DONU ŜANCON AL OBJEKTOJ !

La plejparto de la dokumentoj de mezepoko aŭ de antikveco hodiaŭ subvitre konservitaj en klimatizitaj muzeoj kaj bibliotekoj, en sia epoko prave havis nenian valoron, ĉar ili tiam estis multnombraj de sia peco, kaj ili plejfoje traktis nur banalajn temojn. Sed hodiaŭ, sumera argila tabelo, mirakle ĝis nun trairinta kvin kvarmilojn, kiu ekzemple notis vendokontrakton de azeno aŭ kuracistan ordonon, fariĝis valoregan dokumenton. En la tempo de Hamurabi kompreneble neniu konsideris kiel gravajn tiajn bagatelaĵojn, kaj neniu atentis pri ilia konservado. Nur grandega sinksekvo de favoraj hazardoj faris ke kelkaj el ili eskapis al malapero kaj trairis Tempon.

La valoro de ordinara objekto varias laŭ la tempo. En sia komenco, ĝi pli kaj pli senvaloriĝas pro eluziĝo kaj apero de pli moderna samcela objekto. Ĝia ofteco ĉirkaŭ ni instigas nin, kiuj ne povas ĉion konservi pro nesufiĉa negrandeco de niaj domoj, periode senbalastiĝi de senutiliĝintaj ĝenigaĵoj. Plie, nova generacio heredinta tiujn domojn, devas plejofte ilin vendi, kaj pro tio ilin malplenigi de tegmento al kelo. Oni do devas detrui aŭ brokante vendi estontajn trezorojn. Se rara lontanvidinto spertas voletimpulsojn ion konservi, tuj modernemaj familianoj lin primokas kaj lin revenigas al la sana, racia komuna sinteno kiu konsistas ĉion malnovan bruli, forĵeti, vendi. Sed iam, oni hazarde rimarkas en brikabraka foiro, ferdratan saladsekigilon aŭ manborilon kiujn oni ankoraŭ posedis dudek jarojn antaŭ, heredintaj de siaj avoj. Oni tiam ekkonscias kun iom da nostalgio, ke tiuj objektoj ne plu estas kutimaj.

La valoro, mona kaj sentimentala, de malnovaj libroj, veturiloj, vestaĵoj, ĵurnaloj, ludiloj ... kiujn oni malestime negletis, komencas kreski post ilia kritika periodo de junaĝo. Tiel, mi posedas ekzempleron de la banala ĵurnalo « *Le Constitutionnel* » de la 12a de januaro 1858 (sub Napoleono la III-a !) : Kiu nun pensus ĝin utiligi por ekbruligi fajron aŭ enpakigi kion ajn, malgraŭ ĝia tute moderna aspekto ? La muzeo de Pompei nin interalie prezentas malnovan sandalon, dumiljarajn juglandojn, brulitan panon, ... Neniu nuntempe opinias tion ridindan. Ni ankaŭ, devas kontribui al la plezuro de niaj malproksimegaj praidoj iam admiri aĵojn de nia epoko, kiujn ni nun taksas rubaĵojn. Frida raciulo verŝajne diros « tio ne koncernas min, mi ne partoprenos tiun plezuron ». Kiu ion scias kun certeco pri tio ? Sed estas tute alia demando kiun mi ne ektuŝos.

Mi nur lanĉos pasioplenan solenan alvokon (☺) *(1)* al konservado de objektoj kiuj povos esti estontaj atestantoj de nia epoko, ... se la nin sekvontaj generacioj samfaras kiel ni. Ni ne timu ke la konservitaj aĵoj estu tro multaj kaj tiel perdu ĉiun valoron, ĉar fakte post tri mil jaroj se la nuna kvoto de loĝantara kresko restas kion ĝi estas nun, la monda loĝantaro estos tiel kreskinta ke la proporcio de niaj antikvaĵoj komparita kun la dirita loĝantaro estos komparebla kun la aktuala proporcio de romiaj antikvaĵoj kun la nuna loĝantaro. Ni ne estu tro modestaj, opiniante ke ni ne interesos niajn posteulojn; ĉu niaj antaŭuloj ne interesas nin ?

Do, estu ke la historiistoj kaj arkeologoj povu kun respekto kaj blankaj gantoj, manipuli mian teleron kaj mian mustardoglason en la jaro 5012 de Nia Sinjoro, Amen !... aŭ 4536 de Heĝiro, Amin !

*Mathieu, 25.05.2012.* **Henri ROUSSEAU**

*(1) Malfeliĉe la « ironia signo »* (point d'ironie) *kiun la franca* Alcanter de Brahms *provis enkonduki dum la 19a jarcento, apud la demanda signo (?) kaj la kria signo (!), ne sukcesis. Mi estus ĝin tie uzinta anstataŭ « emotikonon ». La modernaj vortaroj eĉ ne plu mencias ĝin. Sed la nun neevitebla interreto kontentigas la sciemon de interesatoj kiuj dank'al ĝi povos trovi la formon de tiu malofta signo.*

## La Mil Eŭroa Ludo

La Mil Eŭroa Ludo estas tre fama ĉiutaga ludo ĉe "France-Inter". Estas agrabla rendevuo, en etoso simpatia kaj modesta. Multaj homoj aŭskultas ĝin dum la manĝopreparo, aŭ inter la fromaĝo kaj la deserto kaj tre kontentas kiam ili sukcesas respondi unu/du el la ofte malfacilaj demandoj.

Mardon 12an de junio, la ludo okazis en Livarot, urbeto ĉefe fama pro sia bongusta fromaĝo. Kandidatis iu virino kaj **Thierry LELOGEAIS**, tiea loĝanto sed ankaŭ ano de la klubo de Hérouville Saint-Clair. Thierry entuziasmigis nin kiam li (kun sia partnero) demandon post demando trafe kaj senhezite respondis ĝis la fina venko (« superbanko »). Ili gajnis 1 000 € kaj Thierry ankaŭ sukcesis aludi pri Esperanto ! Gratulon al nia klubano, cetere tre klera pri la esperanta kaj la franca gramatikoj, kaj pri multaj lingvoj.

**Yves NICOLAS**

espéranto Normandie

# La SELEKTIVA ABORTO De KNABINOJ

(Resumo de la numero de 9/2004 de la bulteno *« Population et société » de la franca Nacia Instituto pri demografiaj studoj (INED) )*

1. La Vireca Ratio ĉe Naskiĝo (VRN) *(Rapport de masculinité à la naissance, Sex ratio at birth)*, estas universala biologia konstanto de la homa speco ; ĝi egalas 105 knaboj por 100 knabinoj.
2. De kelkaj jaroj, en kelkaj landoj, tiu natura ratio ŝanĝis pro homaj agadoj. En Ĉinio interalie, kie tradicie oni ofte murdis bubinojn, la VRN estas meznombre naciskale 117 (2004), de kiam eĥografio ekzistas. Sed tiu ratio ankoraŭ pli diverĝas de ĝia natura valoro 105, se oni konsideras la rangon de naskiĝo de la infanoj. Tiel, por la unua infano de la paroj, la ratio restas je 105 ; por la dua infano, se la unua estas knabino, ĝi supreniras al 149 ; por la tria, se la du unuaj infanoj estas knabinoj, ĝi atingas 225 !
3. La ciferoj estis kompareblaj en Suda Koreo ĝis kiam la estraro malpermesis la riveladon de la sekso de alvenonta bebo, konebla per eĥografio, sub puno de altega monpuno kontraŭ la rivelinto. En tiu lando, la VRN kiu estis atinginta 117 en 1990, refalis al 109 en 2000.
4. Indio (VRN = 108), kaj kelkaj kaŭkazaj landoj, ŝajne ankaŭ ekiras al selektiva aborto de knabinoj.
5. En Francio, la statistikoj indikas kvazaŭ deziron de ekvilibro de la seksoj. Oni ne konstatas selektivan aborton de knabinoj. Sed ciferoj tamen rivelas ian etan preferon por la knaboj ; fakte, ĉe la paroj kiuj jam havas du infanojn, oni konstatas statistike malsaman sintenon koncerne la '' mendon'' de tria infano, laŭ la tri eblaj disdonadoj de seksoj de tiuj du unuaj infanoj. (*Vidu la ĉi-apudan tabelon*)
6. En la landoj jam trafitaj de supernaskiveco de virseksuloj, eĉ se decidoj rapide okazas por restarigi ekvilibron de seksoj, post kelkaj jaroj gravaj problemoj aperos : ia procento de la viroj ne povos enpariĝi kaj la novaj generacioj nekomplete anstataŭos la malnovajn. La demografia kresko de tiuj landoj rapide falos, kaj la meza aĝo de la loĝantaro rapide plialtiĝos.

| En Francio kaze de : | Knabo kaj knabino : | Du knaboj : | Du knabinoj : |
|---|---|---|---|
| Proporcio de paroj kiuj « mendas » la trian infanon | 29 % | 32 % | 36 % |

*Henri ROUSSEAU*

# Belan legendon :

Iun belan nokton, en eta stalo de la vilaĝo Betelemo, naskiĝis bebo kies nomo estis Jesuo. Tiam la belega Stelo de Paŝtisto gvidis la Tri Reĝojn ĝis la Diinfano por festi ties alvenon.

Poste, tiu ege luma stelo ne povis reveni en la ĉielon kun la ordinaraj steloj ĉar la homoj povus kredi je la nasko de alia nova Mesio! Tiam la tro bela stelo serĉis idealan rifuĝejon sur nia planedo.


Ĝi superflugis ĉiujn oceanojn, ĉiujn dezertojn, ĉiujn ebenaĵojn... Vane! Post tre longa serĉado, iun printempan vesperon, ĝi fine alvenis super la montoj Alpoj. Kion vidis la stelo? Altajn krutajn kulminojn, mallarĝajn kaj verdiĝantajn valojn, serpentumantajn rojojn meze de riĉaj paŝtejoj. Kaj ankaŭ homojn, modestajn kaj respektindajn.

Jen la serĉata juvelujo!

La dika stelo partiĝis en miloj kaj miloj da etaj steloj kiuj delikate surteriĝis sur la belajn kaj kvietajn altajn montojn. Por sin protekti kontraŭ la malvarmo, tiuj steletoj ornamiĝis per dika silka lanugo.

La morgaŭan matenon, paŝtistoj kaj ĉasistoj malkovris tiujn miraklajn florojn dumnokte aperintajn.

Ili nomis ilin "edelvejso", la Stelo el Argento.



*(Legendo de la valo Alta Morjeno, en francaj Alpoj)*

***Gérard SENECAL***